Grenoble. Rada miejska wyznaczyła sumę 100 franków na premje dla dzieci miejscowych szkół, uczących się Esperanta.

Toulon. Po odczycie lejtnanta Martin'a — 32 osoby zapisały się na członków miejscowej grupy; nowy kurs rozpoczęty.

Saint Omar. Burmistrz ofiarował do dyspozycji miejscowych esperantystów salon „Salle des Concerts“, gdzie będą odbywały się posiedzenia miejscowego Towarzystwa.

Niemcy.

Berlin. Powstało kilka nowych kursów Esperanta.

Chemnitz. W tut. „Königl. Gewerbe-Akademie“ — wykłady Esperanta.

Norymberga. Po dwóch odczytach d-ra Orthala — 78 policjantów zapisało się na kursy Esperanta.

Gdańsk. Komendantura rozesała zaawdomienie do pulków okręgu, że U. E. A. otworzy bezpłatne kursy języka Esperanto.

Drezno. Otworzono 3 kursy w magazynach konfekcji Herm. Mühlberg'a; uczęszcza 80 słuchaczy płci obojga. — Kursy w „Czerwonym Krzyżu“; 30 słuchaczy.

— Dwa specjalne kursy dla „Verein für Handlungskommis von 1858“.

— Wiele drezeńskich firm z okazji Wszechświatowej Wystawy Hygienicznej wydało katalogi i prospekty w języku Esperanto.

Lipsk. Odbył się bardzo liczny kongres niemieckich esperantystów.

Anglja.

Southport. Odbyty tu kongres esperantystów angielskich zgromadził 400 osób.

Coventry. W pismach „The Recorder“, „The Sentinel“ — stałe tygodniowe kronika o ruchu esperanckim.

Włochy. „Ruĝa broŝuro“ (broszura propagacyjna) została wydana w 350,000 egzemplarzy.

Bolonja. Książd Ferdynand Vezzi wy-

głosił propagacyjne odczyty w Weronie, Vergato, Cento, Vicenza.

Genua. Założono Związek katolików-esperantystów; prezesem jest książd Don Facco.

— Założono także grupę esperancką antyklerykalną; sekretarz — G. Rossi.

— Otwarto nowe kursy w szkołach publicznych.

Medjolan. Założono towarzystwo „Circolo Esperantista Milanese“.

Rosja.

Połtawa. Powstała nowa grupa przy seminarjum.

Kostroma. Zmarł tu bardzo czynny „samideano“ dr. Komarow.

Tomsk. Powstało „Tomskie T-wo Esperanckle“.

Chiny.

Mukden. Dzięki staraniom p. J. M. Vu powstało tu towarzystwo esperanckie. Na kursy uczęszcza 200 słuchaczy.

Ameryka Północna (Usono).

— Nowe kursy w Rockville, York, Aurora, Levis, Amarillo, Elgin, Switzer, Leadville, San Francisco, Coquille etc.

Missouri. Kursy w Kolegium katolickim.

Nowa Zelandja.

Patronami T-wa esperanckiego są: Prezes Ministrów Sir Joseph Ward i George Fowlds, Minister Oświaty. T-wo liczy 230 członków.

Egipt.

Kair. Powstał „Egiptski Związek Esperancki“.

Poparcie Oficjalne.

Redakcja nasza otrzymała egzemplarz okólnika oficjalnego w dwóch językach (po nowogrecku i esperancku), podpisanego przez Jego Książęcą Mjśc Książęcia Samosu. Okólnik ten zaleca nauczycielom wyspy uczenie się Esperanta, wobec jego wielkiego powodzenia i korzyści, jakie daje znajomość tego języka, wykładanego w szkołach wyspy Samos. Kursy dla nauczycieli są zorganizowane w stolicy i będą trwały od 4 do 14 lipca i 20—30 sierpnia — czytamy dalej w okólniku. Nauczyciele po przejściu kursu otrzymają odpowiednie dyplomy.

Pola Kroniko.

Pro la somera libertempo esperanta vivo en Varsovio kaj en la provinco pulsas malforte: ĝi ripozas por vekigi en la aĵtuno.

Tamen ni ricevis kelkajn sciigojn, kiuj rajtigas nin supozi, ke niaj bravaj samideanoj ripozas, sed ne dormas.

Kalisz. 22-an de Junio okazis kunveno de Societo „Lumo“. Estis preparolitaj multaj aferoj, inter aliaj: Pri VII-a Kongreso (s-ro B. Szczepankiewicz), pri U. E. A. (s-ro M. Kaus), pri dezirinda valorigo de internaciaj kuponoj en Rusujo kaj pri propaganda vojaĝo de s-ro Parish (prepar. s-ro Eskimenko).

13-an de Junio okazis esperanta ekskurso en la arbaron. Partoprenis kaj amuze pasigis la tempon kelkdek samideanoj.

Plotrków. La korespondanto de „Goniec“ el Piotrków skribas interalie, ke la loka policestro ordonis forigi kelkajn butik-elpendajn-ojn, skribitajn en la lingvo Esperanto, ĉar la nomita lingvo ne estas oficiale akceptita kaj komprenebla. Vere, en P. troviĝas du esperantaj surskriboj: unu ĉe la konditorejo kun la teksto: „Teo, kafo, ĉokolado kaj diversaj trinkaĵoj“ — kaj la dua surmura surskribo: „Bakejo“. Estas interese scii, ĉu la policestrajn okulojn frapas tre multaj en Piotrków butikaj surskriboj en la hebrea jargono? Ĉu eble la jargono estas oficialigita? Ĉu ilin ankaŭ minacas la policestra ordono?

Krakovo. En raporto de la Komerca Akademio en Kraków por la jaro 1911 ni legas:

„Rondeto Esperantista“ dum siaj kunvenoj, gvidataj de s-ro Wl. Grabowski, aranĝadis konversacion por ekzerciĝi en interparolado kaj tiamaniere prepariĝi al internacia esperantista kongreso en Kraków (1912), en kiu ĝi intencas aktive partopreni. Ĵurnaloj, granda movado en esperantista biblioteko, kiu montriĝis nesufiĉanta, kaj multnombraj korespondantoj de lernantoj kun kolegoj de aliaj komercaj Akademioj pruvas plej bone la disvastiĝon de ĉi-tiu lingvo en la Instituto.

Krom tio s-ro Wl. Grabowski instruis la Esperanton al lernantoj de malsupera kurso.

El pola gazetaro.

Artikolojn pri la Kongreso en Antverpeno enhavis: „Kurjer Poranny“ (trifoje), „Kurjer Warszawski“, „Dzień“, „Kurjer Polski“ k. a.

Filatelista (№ 4—5) enhavas tre lerte kaj interese skribitan kronikon kaj multajn informojn pri esperanta movado. Ni ne dubas, ke sindona laboro de nia estimata samideano s-ro Roman Kamiński estos fruktodona.

En la sama n-ro — opinio pri Esperanto esprimita de la fama prof. August Forel; ĉi-tiun bonegan artikoleon ni represas.

Kurjer Łódzki (№ 181). Komitatano de Lodza Societo, s-ro Wl. Wojciechowicz en, pli longa artikolo klarigas, ke Lodza Societo havas tute polan karakteron, kvankam ĝi kunigas aligentanojn, kio ja estas unu el la principoj de esperantismo.

Kurjer Kaliski (№ 172). La frunta artikolo, titolita: „Sana spirito en sana korpo“ — priskribas Dresdenan Higienan Ekspozicion kaj ĝian grandan signifon por la tuta mondo kaj por la esperantistoj.

En la № 170 ni trovas kronikan noton de Kaliŝa Societo „Lumo“.

En la № 161 — artikolo de Hape pri la bezono de la lingvo internacia.

Dziennik Polski (5 de Junio) en artikolo: „Venko de Esperanto“ priskribas la konatan konkurson de „Excelsior“.

Kurjer Lwowski (13 de Julio). Ni trovas artikolon: „Internacia Kongreso de Esperanto en Krakovo en 1912 j.“

Gazeta Poranna (№ 168). La tuta paĝo por Esperanto! Ni plezure legis la represon de artikolo de s-ro St. A. Dobrzański: „Pri la afero de la lingvo internacia“ (el 1—3 nroj de „Pola Esp.“) kaj la opinioj pri Esperanto, kunmetitaj de s-ro Javoro.

Wiek Nowy (n-ro 2994) represas alvokon al junularo, skribitan de Lvova Teknikista Grupo; la alvokon ni presis antaŭe en la 1—2 n-roj de „Pola Esp.“.

En la sama gazeto (n-ro 2989) — bonega propaganda artikolo pro okazonta en Krakovo VIII-a Kongreso.

Wieczory Rodzinne enmetis en la aldonon „La kondukanto por lernanta junularo“ la konatan alvokon al pola Junlaro, presitan en n-ro 1—2 de „Pola Esp.“

Ni, je la nomo de nia kara afero, kore dankas la redakciojn kaj samideanojn, kiuj sendis al ni la gazetojn.

La Kongreso de polaj esperantistoj.

Jam de kelkaj jaroj t. e. de la tempo de Dresdena Kongreso oni multe parolis en societoj esperantistaj kaj ankaŭ private, ke jam venis tempo por aranĝo de la Kongreso de polaj esperantistoj. Kaj vere, se ne estis ĝis nun — do jam estas tempo! Ni multe parolas kaj skribas pri la okazonta VIII-a Universala Kongreso Esperantista en Kraków, pri ĝia sukceso, sed ni ankoraŭ ne volis, ĉu ne povis aranĝi nian nacian kongreson. Multaj demandoj kaj proponoj bezonas kaj postulas vastan kaj diversfakan diskuton. Intertempe ni Poloj en Galicio ĉion faras niakutime — „famille“, mi dirus. Unu jaro ankoraŭ al VIII-a U. K. E. — ĉiu kaj kiel laboras? Krakovaj niaj samideanoj kun s-ro S. Rudnicki moviĝas jam de kelkaj monatoj, sed preskaŭ ĉiuj aliaj societoj kaj solaj esperantistoj dormas, ĉar ili „ametas“ rigardi la fruktojn de laboro ne sia.

Senkulpigu vi min, karaj samideanoj kaj tiujn kelkajn maldolĉajn vortojn! Sed vere jam estas tempo — do al laboro! Finiĝas la somera libertempo do komencu ni nian laboron!

Mi proponus por loko de I-a Kongreso de polaj esperantistoj — la urbon Lwów kaj tempon 4-an kaj 5-an de Novembro k. j., ĉar tiutempe okazos en Lwów granda Esperanto-Ekspozicio, aranĝata de „Teknikista Grupo de Esperantistoj“. Se tamen krakovaj samideanoj nepre volus aranĝi ankaŭ tiun Kongreson en Kraków — ni tion konsentus, sed nur tiuokaze, se la tempo de Kongreso devus esti prokrastota, ekzemple ĝis Decembro aŭ Januaro, kiam finiĝus jam la Lvova Ekspozicio.

Ĉiujn proponojn kaj demandojn bonvolu sendi al mi laŭ subecitita adreso kaj poste el tiu materialo mi sendos raporton al „Pola Esperantisto“. Tiamaniere ni faros la unuan paŝon al aranĝo de I-a Kongreso de polaj esperantistoj.

Vladislav Giercuszklewicz

prezidanto de Lvova „Teknikista Grupo de Esperantistoj“

Lwów — Politekniko.

El Esperanta Mondo.

Gazetaj peresperantaj korespondantoj.

Kelkaj norvegaj jurnalaj reglue duonmonate enpresas pri la socia aŭ politika vivo artikolojn eksterlande skribitajn *per Esperanto*. Same faras ankaŭ alilandaj jurnalaj. La artikolojn liveras la anoj de la „Internacia korespondarondo“, kiu havas reprezentantojn jam en 15 landoj. Estus tre dezirinde, ke la rondo akiru korespondantojn en ĉiuj landoj. Interesatoj sin turnu al s-ro R. Buseth (*Namsos, Norveg.*).

Esperanto dum la Avlada Eŭropa rondvojaĝo.

Okaze de tiu grava sporta manifestado, organizita de *Le Journal*, nia fama samideano Henry Farman, la unua homo, kiu flugis unu kilometron en Francujo, nuntempe konstruisto de aeroplanoj, prenis la jenajn decidojn:

1) Ĉiuj aeroplanoj de la firmo Henry Farman portos, kiel distingantan signon, du verdajn stelojn

esperantistajn, pentritajn sub la malsupraj aloj de la biplano (tiamaniere, ke tiuj steloj estos videblaj, kiam la aeroplano pasos super la kapoj de la rigardantoj).

2) La aŭtomobiloj de la firmo Henry Farman, kiuj sekvos la kuradon, estos ornamitaj per flagoj esperantistaj.

3) En la grandaj urboj, kie estas deviga haltejoj, la firmo Henry Farman verŝajne metos nian esperantan standardon super la remizo.

Kvar biplanoj Henry Farman partoprenos la aerkuradon. Ili estas enskribitaj sub la numeroj: 22, 30, 59 kaj 60.

Tiuj decidoj de la firmo Henry Farman estas grava propagando por Esperanto, kaj ni esperas, ke la ĉiulandaj esperantistoj bonvolos helpi kaj gratuli nian samideanon.

(El „*Esperanto*“.)

C. B.

Revuo de la Gazetoj.

NOTO. En ĉi tiu fako ni regule citas ricevatajn interŝange gazetojn en kronologia vicordo—laŭ tempo de ilia ricevo.

(29|VI) **Germana Esperanto-Gazeto** (4, 11, 18, 25 Junio).

(30|VI) **Sarta Stelo** (Junio).

(3|VII) **Laborista Esperantisto** (Majo—Junio).

(4|VII) **Internacia Socia Revuo** (Julio).

(4|VII) **Esperanta Informilo** (Junio).

(4|VII) **La Du Steloj** (Januaro—Februaro kaj Marto—Aprilo).

5|VII) **La Korespondanto** (14, 21, 28 Majo; 4, 11, 18, 28 Junio). Semajna gazeto ilustrata, propaganda, literatura kaj meteorologia; abono 71^{fr}, frankojn; red. kaj admin.: G. Cruz Nueva, Valencia (Hispanujo); red.-dir. R. Duyos.

La gazeto kvankam nur dufovia, sed tre simpatia kaj bone ilustrata.

Ni sendas al nia nova semajna kolego niajn korajn bondezirojn.

(6|VII) **Eŝo Esperantista** (Junio).

(6|VII) **Esperanta Penso** (Junio).

(6|VII) **Gazeto Hispana** (Junio).

(6|VII) **Voĉo de Kuracloj** (Julio).

(7|VII) **Amerika Esperantisto** (Junio). Nova adreso de la redakcio estas: 2404 Fourteenth Street, N. W. Washington D. C.

(7|VII) **Internacia Polica Bulteno** (Julio).

(9|VII) **La Revuo** (Julio).

(9|VII) **La Movado** (Julio).

(10|VII) **Lingvo Internacia** (Junio).

(10|VII) **The British Esperantist** (Julio).

(10|VII) **Germana Esperantisto** (Julio).

(10|VII) **Mitteilungen** (Julio).

(12|VII) **Germana Esperanto-Gazeto** (9 Julio).

(12|VII) **La Dek-Sepa** (Julio).

(12|VII) **Kataluna Katoliko** (Junio).

(13|VII) **Oficiala Gazeto Esperantista** (25 Junio).

(13|VII) **Danubo** (Junio).

(13|VII) **Rund um die Welt** (Julio—Aŭgusto).

(13|VI) **Itala Esperantisto** (Marto—Aprilo).

(13|VII) **Paris-Esperanto** (Julio).

(13|VII) **Espero Katolika** (Junio). En la artikolo „Pri legendoj“ ni legas:

„...Tian legendon oni povas legi en „Pola Esperantisto“ pri „Tento de satano“, sed ne, ke la satano tentis, sed ke satano estis tentita. Do la preciza titolo devus esti „Tento al satano“. Tiu-ĉi legendo estas bele skribita kaj tre bone tradukita, sed ĝi ne koincidas kun sankta Evangelio. La homoj, kiuj konas la Evangelion, ne povas esti edifitaj per tiu artikolo, kaj kiuj ne konas la Sanktan Skribon, povas esti erarigitaj kaj fine neniu povos havi profiton de tiu legendo.

La esperantisto traleginte ĉi-tiun legendon en „Pola Esperantisto“ (numero de Majo 1911) penis argumenti dum kunveno de societanoj, ke la Kristo tentis la diablon en dezerto kaj instruis ĉi-tiun pri ok benoj, kaj kiam oni riproĉis lin, ke tio ne estas vero, li argumentis, ke tio estas skribita en „Pola Esperantisto“ kristano, do tio nepre estas vero; kaj je aserto, ke Evangelio tion alie rakontas, li argumentadis, ke la verkisto tre bone konas Evangelion, do eble Evangelio, kiu rakontas tion alie, ne estas vera Evangelio, ĉar ne diablo tentis, sed la diablo estis tentita.

H. W.

(13|VII) **Germana Esperanto-Gazeto** (2 Julio).

(13|VII) **Esperanto** (5 Julio).

(18|VII) **Germana Esperanto-Gazeto** (16 Julio).

(20|VII) **La Holanda Pioniro** (Julio).

(20|VII) **German-Aŭstria Esperantisto** (Julio).

(20|VII) **Tutmonda Espero** (Junio—Julio).

(20|VII) **Le Phare Sténographique** (Julio).

(21|VII) **Voĉo de Kuracloj** (Aŭgusto).

(21|VII) **Nova Sento** (Julio).

(21|VII) **Ĝestudentaj Intereso**j (Aprilo—Julio).

(21|VII) **Nederlanda Katoliko** (Junio).

(22|VII) **Greklingva Esperantisto** (Junio).

(22|VII) **Kaukaza Esperantisto** (Junio).

(22|VII) **La Marto** (Julio).

(22|VII) **Helpa Lingvo** (Junio).

(22|VII) **Belga Esperantisto** (Julio).

(22|VII) **Bulletin Officiel** (Julio).

(23|VII) **Amerika Esperantisto** (Julio).

(24|VII) **La Spritulo** (Julio).

(24|VII) **La Vagabondo** (Julio) Organo de Esperantista Vagabonda Klubo; red.: 16, Westbourne Gardens Hove, Sussel, Anglujo; abonprezo 1.25 ^{fr}S.

Revuo por Arto, Muziko, Literaturo. Eldono bela, kun belaj ilustraĵoj.

(25|VII) **Esperanto** (20 Julio):

„...Eble oni kulpigos min, ke tro ofte mi insistas pri tiu punkto: la supereco de la uzado sur la simpla propagando, sed mi konfesas, ke por nia tuta movado mi ne vidas pli grandan danĝeron, ol la senmezuran ekskluzivan propagandon kaj tion mi timas, ĉar mi konas ĝiajn rezultatojn. En la momento, kiam oni diversflanke agitas la demandon pri plibonigo de nia propagando de novaj propagandaj organizaĵoj, ĉu estas al mi permesite diri: Se vi trovas, ke Esperanto ne progresas sufiĉe rapide, tion kaŭzas ne la fakto, ke via propagando estas malbone aŭ ne sufiĉe organizata, sed ĝi male devenas el tio, ke vi tro multe

propagandis Esperanton kaj ne sufiĉe ĝin uzis; vi parolis pri bela estonta palaco, sed vi apenaŭ konstruis ĝian fundamenton. Vi predikis pri la utila rolo, kiun havos esperantismo por la estonta homaro, kaj vi eĉ ne pensas pri tiu, kiun ĝi povas havi en nia nuna esperanta homareto. Anstataŭ krei novajn esperantajn organizadojn, kiuj devus organizi „grandiozajn“ manifestojn, vi donu prefere vian atenton al tio, kio vere estas fruktozona kaj daŭra, ĉar ĝi estas la celo de nia tuta movado, la *uzado* de Esperanto. La pure propagandaj grupigoj estas tre sufiĉe multaj, se ne tro. Vi plendas, ke la rezultatoj ne estas ankoraŭ kontentigaj; ĉu vi komprenas, ke pli bonajn vi atingos ne per plibonigo de metodo, kiu sole aplikata, estas esence malbona, sed per la metodo, kiu anstataŭ la propagando metas la uzadon je la unua rango de niaj priokupoj kaj laborceloj?”

(30|VII) *Lingvo Internacia* (Julio).

(30|VII) *Germana Esperanto-Gazeto* (50 Julio).

(30|VII) *La Propagandisto* — Trimonata propaganda folieto; red.: 135, High Holborn, London W. C.; abonpago 200 sp.

(1|VIII) *Juna Esperantisto* (Julio).

(2|VIII) *Kataluna Katoliko* (Julio).

(3|VIII) *Monda Poŝto* (25 Julio).

(6|VIII) *Internacia Socia Revuo* (Aŭgusto).

(6|VIII) *Sicef* (Société Industrielle et Commerciale Espérantiste de France) monata bul-teno; esperante kaj france; red. 18, Avenue Philippe-Auguste, Paris, XI-e.

„Konigi Esperanton al la Komercistaro, esti peranto inter la komercisto kaj la kliento, kunhelpi al la interrilatoj de komercistoj ĉiulandaj per Esperanto, labori por la ĉiutaga praktika uzado de Esperanto en komerco kaj Industrio, unuvorte komerco per Esperanto — jen la celoj de la *Societo Industria kaj Komerca de Francujo*.”

(7|VIII) *Esperanto* (5 Aŭgusto).

(7|VIII) *Gazeto Hispana* (Julio).

(7|VIII) *Juneco* (Majo—Junio).

„Pli bone malfrue ol neniam“ — diris al si la Redakcio de „Juneco“ kaj aliĝis al la „Deklaracio de la Esperantistaj gazetistoj“ (Deklaro de fideleco por Zamenhofa Esperanto). Gratulojn!

(7|VIII) *Germana Esperanto-Gazeto* (6 Aŭgusto).

(8|VIII) *La Holanda Pioniro* (Aŭgusto).

(8|VIII) *Espero Katolika*.

(8|VIII) *La Movado* (Aŭgusto).

(8|VIII) *The British Esperantist* (Aŭgusto).

(8|VIII) *Germana Esperantisto* (Aŭg.—Sept).

(8|VIII) *Eŝo Esperantista* (Julio).

(9|VIII) *Franca Esperantisto* (Aŭgusto).

(9|VIII) *Lingvo Internacia* (Julio).

(9|VIII) *Juna Esperantisto* (Julio).

(10|VIII) *Mittellungen* (Aŭgusto).

(10|VIII) *Nederlanda Katoliko* (Aŭgusto).

(10|VIII) *Sarta Stelo* (Julio).

(10|VIII) *Bulletin Officiel* (Aŭgusto).

(10|VIII) *Oficiala Gazeto Esperantista* (25 Julio).

(10|VII) *La Revuo* (Aŭgusto).

(10|VIII) *Le Monde Esperantiste* (Julio).

(11|VIII) *Časopis Českych Esperantistů* (Junio—Julio).

Ni trovas represon de nia konkurso pri „je“ kun hoĉem-lingva traduko de proponitaj ekzemploj. La redakcio opinias, ke la plej bonaj aŭtoroj evitas uzadon de la prepozicio „je“, anstataŭtante ĝin al per IV-a kazo aŭ alia prepozicio — laŭ senco. — Ni pensas, ke bonaj aŭtoroj ne timas uzi la prepozicion „je“, ĉar ili uzas ĝin ĝuste kaj nur en okazoj, kiam „je“ estas *necesa, neanstataŭebla*. Tiaj okazoj sendube ekzistas. La Majstro antaŭvidis ilin kaj kreis la prepozicion „je“ ne sencele.

(13|VIII) *Paris-Esperanto* (Julio).

(13|VIII) *Antaŭen Esperantistoj* (Marto, Aprilo).

(15|VIII) *Germana Esperanto-Gazeto* (13 Aŭgusto).

(18|VIII) *Germana Esperanto-Gazeto* (13 Aŭgusto).

(19|VIII) *Le Phare Sténographique* (Aŭgusto).

(20|VIII) *Helpa Lingvo* (Julio).

(20|VII) *L'Espérantiste Catholique* (Julio—Aŭgusto). Grava artikolo dediĉita al pastro Domrowski, kies jubileon festas Litovujo.

(22|VIII) *Danubo* (Julio).

(22|VIII) *Nova Sento* (Aŭgusto).

Ni trovas la represon de nia konkurso pri „je“ kun anstataŭaĵoj. La aŭtoro de anstataŭaĵoj s-ro Viktoro O. de Allende tre ofte anstataŭas je-n tute nekompreneble por ni, ekzemple:

Aspekti *de* homo sana(?) — Sorto estas avara *al* karesoj(?) — Muta *pri* bonaj vortoj(?) Butonumi *al* ĉiuj butonoj(?) — Mi povas kalkuli (en la senco — *esperu*) *per* miaj dek fingroj(?) — Paralizita *de* ambail piedoj(?) — Mi indignas *pri* vi(?) — Li kaptis aglon *de* flugiloj(?) — Mi esperas *de* via subteno(?) k. t. p.

(23|VIII) *The British Esperantist* (Aŭgusto).

(24|VIII) *Le Monde Espérantiste* (Aŭgusto).

(24|VIII) *La Verda Standardo* (Marto, Aprilo—Junio, Julio—Aŭgusto).

(24|VIII) *Semo* (12, 19, 23, 31 Julio).

(25|VIII) *Greklingva Esperantisto* (Julio).

(27|VIII) *Oficiala Gazeto Esperantista* (25 Aŭgusto).

(27|VIII) *Germana Esperanto-Gazeto* (27 Aŭgusto).

(27|VIII) *Voĉo de Kuracistoj* (Sept.—Okt.).

(28|VIII) *La Revuo* (Septembro).

(29|VIII) *La Ondo de Esperanto* (Julio—Aŭgusto).

Le Théosophie.

La Nueva Ciencia.

HUMORAĴO.

La najbarinoj.

Noveloto de Stanisław Brandowski.

En la pasaĝo d'Andriolli staras du najbarinoj.
— Nu, kara sinjorino, kiel pasos ĉe vi la festoj? — demandas unu.

— Mi devas danki Dion, estos nemalbone.
Ni ja havos anseron...

— Ĉu vere?

— Vi prave miras, sed tamen Dio donis.
Mia Ignac kaptis ĝin, kiam ĝi ien iris. Ĝi certe perdis vojon, ĉu mi scias? Sed ĝi fartos multe plibone ĉe mi, ĉar ĝis la festoj ĝi iom grasiĝos, alie ĝi ja povus frostiĝi aŭ ia hundo povus ĝin kapti. Mia kara sinjorino, ni devas kompati eĉ la bestojn, ĉar ili je estas ankaŭ diaj kreaĵoj, kiuj nur ne povas paroli.

— Vi estas prava. Tiamaniere neniu perdos, ĉar kiu ne gardas la beston, tiu ĝin ne valoras.

— Jes, jes! mi ankaŭ tiel pensas; ni plene konsentas, sekve tio ne estas peko.

— Kaj ĉu flanojn vi ankaŭ havos?

— Komprenoble! Oni bakas en nia domo tiel multajn, ke mi facile povos ion forpreni kaj oni tion tute ne rimarkos. Eble vi pensas, ke mi ne devas tion fari, sed mi diros al vi, ke ĉiujare perdiĝas en la domo multe da miaj propraj objektoj. Kaj kiu prenas, se ne iu el la sama domo? Doman ŝteliston estas tute neeble eviti. Ĉar ili prenas miajn, mi nun prenas iliajn. Justeco estas ĉie necesa. Kaj ĉu vi pensas, ke ni alie faros kun la vino? En

nia domo estas drinkejo kaj mia edzo tiel multe servis al la mastro kaj neniam ion ricevis, maksimume li ricevis 1 kronon aŭ ian vestaĵon aŭ deversitan bieron. Tial mia edzo jam traboris en la kelo barelon kun vino kaj mi nur prunteprenos de la najbarino-akusistino guman tubeton, kies unu pinton ni metos en la barelan truon, la duan — ni eligos tra la fenestro sur la korton.

— Sed ĉu la vino elfluos mem tra la tubeto?

— Ĝi ne elfluos mem, sed mia edzo tiros ĝin per la buŝo, kaj kion li eltiros, li tuj elkraĉos en kruĉon.

— Sed ĉu la vino ne malklariĝos?

— Certe, sed tia vino estas ja pli bona ol nenia. Cetere mia edzo faros tion jam hodiaŭ kaj ĝis la festoj la vino surfundiĝos kaj klariĝos.

— Krist-arbeton vi certe jam havas?

— Vi demandas! Wicek iris al la Bernardina placo kaj estis dungita de unu sinjoro por transporti la pineton al lia domo, sed dumvoje li forkuris kaj alportis ĝin al mi. Tia sprita knabo li estas, kvankam li havas nur 12 jarojn.

— Eble vi memoras, ke mi tuj post lia naskiĝo diris, ke Wicek estos sprita. Li estas tre sagaca. Li jam tiam havis tiel saĝajn okulojn, ke eĉ la hundo ne havas pli saĝajn. Bonvolu lin kisi en mia nomo, ĉar mi jam rapidas. Mi deziras al vi gajajn festojn... Dio benu... mia kara.

Tradukis el pola lingvo WRb.

Respondoj de la Redakcio.

Al s-ro J. Chankowski. Viajn rimarkojn ni akceptis kun profunda danko; kelkajn el ili ni jam aplikas.

Al s-ro Br. Kuhl en Krakovo. Bonintencajn, amikajn rimarkojn kaj konsilojn ni tre volonte, kun granda danko akceptas. Sed la rimarkojn venenajn, esprimitajn en nekonvena formo kaj

cetere, tute senkritike malpravajn — ni jetas en la korbon.
J. G.

Konkursoj kaj problemoj.

Multego da respondoj por anstataŭo de la prepozicio „je“, devigas nin atente ekzameni la alsenditan materialon kaj anonci la rezultaton de la konkurso en la Oktobra numero.

istego znaczenia (np. *goji je tio* cieszyć się z tego; *malsana je la okuloj* chory na oczy; *enuo je la patrujo* tęsknota za ojczyzną i t. p.). Jasność języka wcale wskutek tego nie szwankuje, albowiem w tym razie wszystkie języki używają jakiegokolwiek przyimka, byle go tylko zwyczaj uświęcił; w języku zaś międzynarodowym sankcja we wszystkich podobnych wypadach nadana została jednemu tylko przyimkowi *je*. Zamiast przyimka *je* używać też można biernika bez przyimka tam, gdzie nie zachodzi obawa dwuznaczności.

15) Tak zwane wyrazy „cudzoziemskie“ t. j. takie, które większość języków przyjęła z jednego obcego źródła, nie ulegają w języku międzynarodowym żadnej zmianie, lecz otrzymują tylko pisownię języka Esperanto; przy rozmaitych wszakże wyrazach jednego źródłosłowu, lepiej używać bez zmiany tylko wyrazu pierwotnego, a inne tworzyć według prawideł języka międzynarodowego (np. *teatro* — teatr, lecz teatralny — *teatra*).

16) Końcówkę rzeczownika i przedimka można opuścić i zastąpić apostrofem (np. *Vagner'* zam. *Vagnero*, *de l' mondo* zam. *de la mondo*).

Słowa pochodne.

Z każdego pierwiastka w języku Esperanto można zgodnie z zasadami gramatycznymi i prawidłami formować sobie wiele wyrazów pochodnych. Dzięki temu słownik niezbędny do potocznej rozmowy, może być zredukowany do rozmiarów minimalnych. Ażeby z jednego wyrazu formować inne wyrazy, posiłkujemy się:

1) Końcówkami gramatycznymi: np.: *koleri* gniewać się, *kolero* gniew, *kolera* gniewny, *kolere* gniewnie, *mi koleras* gniewam się; *morti* umierać, *morto* śmierć, *morta* śmiertelny, *mortinto* nieboszczyk; *tuj* zaraz, *tuja* natychmiastowy; *paroli* mówić, *parolo* mowa, *parolanto* mówca i t. p.

2) Łączeniem słów; np.: *eniri* wchodzić (*en* w, *iri* chodzić), *eliri* wychodzić (*el* z, wy...), *aldoni* dawać (*al* do *doni*, dawać); *ŝvit-banajo* łaźnia (*ŝviti* pocić się, *banajo* łaźienka); *vaporŝipo* parostatek (*vapor'* para, *ŝip'* okręt).

3) Uodawaniem do pierwiastków prefiksów (przybranek) i sufiksów (przyrostków), które mają znaczenie oddzielnych słówek; każdy z nich ma swoje określone znaczenie i znajduje się w słowniku.

PREFIKSY.

mal — oznacza wprost przeciwnieństwo, np.: *bona* dobry, *malbona* zły („nie dobry“ tłumaczy się *ne bona*), *estimi* szanować, *malestimi* pogardzać, *bela* piękny, *malbela* brzydki, *beni* błogosławić, *malbeni* przeklinać.

ho — powinowactwo, np.: *patro* ojciec, *bopatro* teść, *bopatrino* teściowa, *ŝwiekra*, *frato* brat, *bofrato* szwagier, *filino* córka, *bofilino* synowa.

ge — dwoje osobników różnej płci, np.: *patro* ojciec, *gepatroj* rodzice, *mastro* gospodarz, *gemastroj* oboje gospodarstwo.

ek — początek lub krótkotrwałość, np.: *kanti* śpiewać, *ekkanti* zaśpiewać, *brili* błyszczeć, *ekbrili* błysnąć. (Porów. sufiks *ad*).

re — zwrot, powtórzenie. np.: *iri* iść, *reiri* wrócić, *doni* dać, *redoni* oddać, *reveni* powrócić.

dis — roz-, np.: *jeti* rzucić, *disjeti* rozrzucić, *disdoni* rozdać.

SUFIKSY.

in — oznacza rodzaj żeński, np.: *patro* ojciec, *patrino* matka, *frato* brat, *fratino* siostra, *koko* kogut, *kokino* kura, *hovo* wół, *bovino* krowa.

id — dziecko, potomek, np.: *hundido* pies, *hundido* szczenię, *koko* kogut, *kokido* kurczę, *bovido* cielę.

vir — oznacza płeć męską, np.: *ĉevalo* koń, *ĉevalviro* ogier, *walach*; *virhundo* pies, samiec.

an — członek, mieszkaniec, np.: *regno* państwo, *regnano* obywatel, *vilaĝo* wieś, *vilaĝano* wieśniak. *Varsoviano* Warszawianin.

ul — osoba z pewnym przymiotem, np.: *malsaĝa* głupi, *malsaĝulo* głupiec, *riĉa* bogaty, *riĉulo* bogacz.

ist — zajmujący się pracą, rzemiosłem, specjalnością, np.: *laboro* praca, *laboristo* robotnik, *hoto* but, *botisto* szewc, *lavi* prać, *lavistino* praczka, *kuraci* leczyć, *kuracisto* lekarz, *ŝteli* kraść, *ŝtelisto* złodziej.

estr — zwierzchnik, np.: *ŝipo* okręt, *ŝipestro* kapitan okrętu, *regno* państwo, *regnestro* panujący.

ar — zbiór, np.: *arbo* drzewo, *arbaro* las, *ŝtupo* stopień, *ŝtuparo* schody, *vorto* wyraz, *vortaro* słownik, *militistaro* wojsko.

er — cząstka zbiorowej całości, np.: *sablo* piasek, *sablero* ziarnko piasku, *fajro* ogień, *fajrero* iskra.

ec — przymiot jako oddzielne pojęcie, np.: *bela* piękny, *beleco* piękność, *bona* dobry, *boneco* do-

broć, *virino* kobieta, *virineco* kobiecość, *amiko* przyjaciel, *amik-eco* przyjaźń.

aj — rzecz z określonym charakterem lub produkt z danego materiału, np.: *malnova* stary, *malnovaĵo* starzyzna, *fruktaĵo* coś zrobionego z owoców.

il — narzędzie, np.: *haki* rąbać, *hakilo* siekiera, *kuĉdi* żyć, *kuĉdilo* igła, *tondi* strzyż, *tondilo* nożyce.

ing — przedmiot, służący do obsady innego przedmiotu, np.: *kandelo* świeca, *kandelingo* świecznik, *plumo* pióro, *plumingo* obsadka.

uj — rzecz zawierająca., roślina wytwarzająca..., kraj, np.: *cigaro*, cygareta, *cigarujo* cygarnica, *pomo* jabłko, *pomujo* jabłko, *polo* Polak, *Polujo* Polska.

ej — miejsce do pełnienia danej czynności, np.: *kuir* gotować, *kuirejo* kuchnia, *preĝi* modlić się, *preĝejo* kościół, *lernejo* szkoła.

et — zdrobniałość lub zniżenie stopnia przedmiotu, np.: *monto* góra, *monteto* górka, *wzgorek*, *ridi* śmiać się, *rideti* uśmiechać się, *dormi* spać, *dormeti* drzemać.

eg — wzmożenie się co do wielkości lub co do natężenia, np.: *pordo* drzwi, *pordego* brama, *pluvo* deszcz, *pluvego* ulewa, *varma* ciepły, *varmega* gorący.

ig — czynić czem, jakim, skłaniać do czego, np.: *pura* czysty, *purigi* czyścić, *morti* umierać, *mortigi* zabijać, *ĉdzigi* zenić.

iĝ — stawać się, np.: *pala* błądy, *paliĝi* blednąć, *fianĉo* narzeczoncy, *fianĉigi* zaręczyć się, *al* do, *aliĝi* przyłączyć się.

ind — godzien, wart, np.: *kred* wierzyć, *kredinda* wiarogodny, *laŭdi* chwalić, *laŭdinda* godny pochwały, *memori* pamiętać, *memorinda* godny zapamiętania.

obl — możliwy, np.: *fleksi* giąć, *fleksebla* giętki, *povi* móżdż, *olvebla* możliwy.

em — skłonność, np.: *kredi* wierzyć, *kredema* łatwowierny, *ŝpari* oszczędzać, *ŝparema* oszczędny.

ad — częstotliwość lub trwanie, np.: *iri* iść, *iradi* chodzić, *esti* być, *estadi* bywać. (Porównaj: *ek*).

ĉj — zdrobniałe imiona własne męskie, np.: *Petro*, Piotr, *Peĉjo* Piotruś, *Jaĉjo* Jaś.

nj — zdrobniałe imiona własne żeńskie, np.: *Mario* Marya, *Manjo* Mańia, *Heleno* Helenka.

um — nie ma określonego znaczenia i używa się w tych razach, gdy inny sufiks niedość określiłby wyraz dany, np.: *plena* pełny, *plenumi* spełnić.

Ćwiczenia — Ekzercoj.

Zdanie powinno być ułożone logicznie, jasno i zrozumiale: jest to jedyna zasada składni esperanckiej.

Rzeczowniki, przymiotniki i przysłówki liczebne.

on liczebnik ułamkowy, np.: kvar cztery — kvarono ćwierć; da zastępuje przypadek drugi po słowach oznaczających miarę, wagę i t. p., urbo miasto, miliono milion, loĝi mieszkać, ant oznacza imiesłów czynny czasu teraźniejszego, aĉeti kupować, aŭ lub, albo, kulero łyżka, forko widły, widelec, ree znowu, napowrót, mono pieniądze, prunti pożyczać, danki dziękować, por dla, za, peti prosić, ankaŭ także, post po, za, potem; kiam kiedy, gdy, bezoni potrzebować, ōhi oznacza liczebnik wieloraki, np.: du dwa — duobla podwójny, pagi płacić, ŝtofo materia, material, kosti kosztować, ĉiam zawsze, op oznacza liczebnik zbiorowy, np.: du dwa — duope we dwoje; jeti rzucać, venki zwyciężać, ataki atakować, paĝo stronica, se jeżeli, gdyby, fini kończyć, tuta cały, paŭny.

Mi havas cent pomojn. — Mi havas centon da pomoj. — Tiu-ĉi urbo havas milionon da loĝantoj. — Mi aĉetis dekduon (aŭ: dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkj. — Mil jaroj (aŭ: milo da jaroj) faras miljaron. — Unue, mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due, mi dankas vin por la prunto; trie, mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (=tio estas) dek frankojn. — Kvinoble ses estas tridek kvin. — Tri estas duono de ses. — Ok estas kvar kvinonoj de dek. — Kvar metroj da tiu-ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ: da frankoj). — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro. — Tiuĵ-ĉi amikoj promenas ĉiam duope. — Kvinope ili sin jetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. — Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. — Tiu-ci libro havas sesdek paĝojn; tial se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

Mam sto jablek. — Mam setkę jablek. — To miasto ma milion mieszkańców. — Kupilem tuzin łyżek i dwa tuziny widelców. — Tysiąc lat stanowi tysiąclacie. — Po pierwsze, zwracam ci (panu) pieniądze, które mi pożyczyłeś; powtóre, dziękuję ci za pożyczkę, po trzecie, proszę cię także później pożyczyc mi, gdy będę potrzebował pieniędzy. — Za każdy dzień dostaję pięć franków, lecz za dzisiejszy dzień dostałem podwójną zapłatę, to jest dziesięć franków. — Pięć razy siedm jest trzydzieści pięć. — Trzy jest połowa sześciu. — Ośm jest cztery piąte dziesięciu. — Cztery metry tej materji kosztują dziewięć franków; dlatego dwa metry kosztują cztery i pół franka. — Jeden dzień jest trzysta sześćdziesiąt piątą albo trzysta sześćdziesiąt szóstą częścią roku. — Ci dwaj przyjaciele spacerują zawsze we dwóch (razem). — W pięciu rzucili się na mnie, lecz ja zwyciężyłem wszystkich pięciu napastników. — Dla moich czworga dzieci kupilem dwanaście jablek i każdemu z dzieci dałem po trzy jablek. — Ta książka ma sześćdziesiąt stronic, więc jeżeli przeczytam codziennie po 15 stronic, (to) skończę całą książkę w cztery dni.

Jako najlepszy podręcznik do nauki Esperanta dla początkujących poleca się:

Gramatyka i ćwiczenia L. L. Zamenhofs, wyd. Arcta 25 k.

Słownik esperancko-polski na jednym arkuszu . 5 k.

„ „ „ naklejony na tekturę 15 k.

Do dalszej nauki polecamy:

Fundamenta Krestomatio L. L. Zamenhofs . rb. 1.40.

Większy słownik polsko-esper. A. Grabowskiego rb. 1.60.

Obszerny słownik esper.-polski S. Czarnowskiego rb. 0.60.

Gramatyka języka Esperanto A. Zakrzewskiego rb. 0.80.

Unua Legolibro d-ra Kazimierza Beina . rb. 0.75.

Kondukanto (Przewodnik) A. Grabowskiego rb. 0.90.

„Esperantysta Polski“, miesięcznik w języku polskim i esperanckim, rocznie z przes. poczt. rb. 2.00.
z „Dodatkiem literackim“ . . . rb. 2.50.

Powyższe książki nabywać można za pośrednictwem Adm. „Esperantysty Polskiego“, Warszawa, Hoża № 20.

Słownik Polsko-Esperancki

A. Grabowskiego

Wydanie większe (553 str.), cena rb. 1.60; w oprawie w płótno angielskie rb. 2.—

Wydanie mniejsze (279 str.), cena rb. —.90; w oprawie w płótno angielskie rb. 1.20

Do nabycia w księgarni M. Arcta Warszawa, Nowy-Świat 53.

W druku—tegoż autora Słownik Esperancko-Polski, wydanie większe i mniejsze.

Obszerny Słownik Esperancko-Polski

zawierający około 7000 pierwiastków i słów pochodnych

⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ułożył St. Czarnowski. ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙

=====
Cena 60 kop. =====

▲ ▲ ▲ ▲ ▲ Do nabycia w księgarniach ▲ ▲ ▲ ▲ ▲

Skład Główny u Gebethnera i Wolffa i Altenberga.

Wydawnictwa propagacyjne.

„Język Międzynarodowy Esperanto”. Arkusz propagacyjny. Zawiera obszerny artykuł, kompletną gramatykę i skrócony słownik. Cena 10 egz.—10 k.; 50 egz.—45 k.; 100 egz.—85 k.; 500 egz.—2 rb.
„Klucz Ĉefeĉ’a”, wydanie polskie, lekkie ($\frac{1}{3}$ lóta). 1 egz.—2 k.; 50 egz.—80 k., 100 egz.—1 r. 50 k.
” ” na papierze grubszym, z okładką kolorową. 1 egz. 3 k.; 50 egz.—1 r., 100 egz. 1 r. 75 k.
” ” w językach franc., niem., angielski, włoski, szwedzki, hiszpański, kataloński, węgierski, duński, czeski, portugalski, rosyjski, rumuński, kroacki, holenderski; pojedyncze egz. po 3 k.; 10 egz.—25 k.; 50 egz. 1 rb.

KARTY POCZTOWE z polskim tekstem propagacyjnym. Ozdobne po 2 k.; 10 szt.—15 k.; 100 szt.—1 r. 00;
” ” Zwyczajne po 1 k.; 10 szt.—8 k.; 100 szt.—70 k.

„ADRESARO DE POLAJ ESPERANTISTOJ” Cena 10 k. (zniżona)

Do nabycia w Administracji „Esperantysty Polskiego”, Hoża 20 m. 12, oraz — w księgarniach

En Administracio de „Pola Esper.”

estas aĉeteblaj

Kolorigitaj Portretoj de nia Majstro

D-ro L. L. Zamenhof

SUR POŝTKARTOJ LAŬ ORIGINALA

VERKO DE KONATA PENTRISTO NIA

FERVORA SAMIDEANO
AUGUST MASKE

Prezo po 5 kop.

Al aĉetontoj de pligranda kvanto—rabato.

DANUBO

Organo de la rumanaj kaj
bulgaraj Esperantistoj

internacia monata gazeto (32
paĝa, 16×24) nur en Esperanto.
Redaktata de speciala komitato
kun la kunlaboraj do de eminentaj
diverslandaj Esperantistoj.

Redakcio kaj Administracio:
5 Str. I. C. Bratianu,

BUCURESTI (Rumanujo).
JARA ABONO: 3,50 fr. (40 S)

Specimena n-ro kontraŭ
respondkupono.

NOWE WYDANIE

Pocztówek esperackich

Z poniższym tekstem propagacyjnym.

Do nabycia w Administracji

„ESPERANTYSTY POLSKIEGO”

ulica Hoża № 20.

CENA 1 egz.—1 kop, 10 egz.—8 kop, 100 egz.—70 kop. (bez przesyłki).

Co to jest Esperanto?

Esperanto jest to język sztuczny, gienjalnie rozwiązujący odwieczny problemat Języka Międzynarodowego

Esperanto jest to język dźwięczny, giętki, logiczny i nader bogaty.

Esperanto zdolny jest wyrazić każde pojęcie i najsukubtelniejsze odcienie myśli ludzkiej.

Esperanto jest neutralnym środkiem komunikacji umysłowej dla całej ludzkości

Esperanto nie ma na celu wyrugowania języków narodowych, lecz ma służyć obok języka ojczystego jako środek pomocniczy w stosunkach międzynarodowych

Esperanto należy do największych zdobyczy kulturalnych 19 stulecia i ma olbrzymią przyszłość przed sobą

Esperanto jest dziełem polskiego lekarza D-ra Ludwika Zamenhoła

Esperanto, jako powstała na ziemi polskiej, przyczynia się do sławy imienia polskiego

Esperanto daje równouprawienie językowe w stosunkach z narodami uprzywilejowanymi

Esperanto usunąć przeszkody w obcowaniu z ludźmi, wynikające z różnojęzyczności

Esperanto ma gramatykę niesłychanie prostą i łatwą — bez wszelkich wyjątków.

Esperanto posiada słownik, składający się tylko z paru tysięcy najbardziej międzynarodowych pierwiastków; każdy inteligentny człowiek zna ich do 50% bez nauki (absoluta, kultura, tendencja, aprobi i t. p.)

Esperanto posiada niezliczoną ilość słów pochodnych, które się tworzą za pomocą 32 sufiksów i prefiksów oraz końcówek gramatycznych

Esperanto znakomicie nadaje się nie tylko do mowy potocznej i korespondencji, lecz i do wszelkiego rodzaju dzieł naukowych i literackich, nie wyluczając poezji

Esperanto dzięki swemu bogactwu, giętkości i logicznej budowie, doskonale nadaje się do tłumaczeń z każdego języka bez zmiany i spactnia myśli.

Esperanto nie jest językiem martwym, ponieważ ulega naturalnemu rozwojowi, — nie dowolnie jednak, lecz prawidłowo i logicznie, zgodnie z zasadami swej budowy.

Esperanto dzięki swym wyjątkowym zaletom zyskał na całym świecie powszechne uznanie. Instytucje naukowe, znaniomci uczeni i myśliciele wypowiedzieli o nim najpochlebniejsze opinie.

Esperanto ułatwia naukę innych języków i przyswajają do analizy językowej i syntezy

Esperanto obecnie jest już rozpowszechniony o tyle że niema kraju i miasta, gdzieby nie było esperantystów.

Esperanto szczególniejszym uznanie cieszy się w najkulturalniejszych krajach, bo — Francji, Anglii, Niemczech i Ameryce

Esperanto już obecnie daje doradzić korzyść, umożliwiając stosunki z całym światem

Esperacki tekst można czytać przy pomocy słownika, nawet bez znajomości gramatyki, w żadnym innym języku jest to nie możliwe

Esperanto nadaje się do prowadzenia korespondencji z ludźmi, nieznanymi tego języka; należy tylko do listu dołączyć „Klucz Esperanto” (Cefeča (wazy 1/2 lita i kosztuje 5 groszy).

Esperanto usunie z czasem potrzebę nauki obcych języków, na co teraz w szkołach nieprodukcyjnie marnuje się tyle czasu i siły; naukę zaś czas można będzie poświęcić nauce języka ojczystego oraz innych przedmiotów, wzbogacających umysł i wiedzę.

Esperanto ułatwi korzystanie z dzieł naukowych i literackich całego świata, gdyż każde dzieło wybitne wystarczy przetłumaczyć tylko na Esperanto, aby uprzęstąpić je dla wszystkich narodów.

Esperanto stało i coraz więcej rozpowszechniło się, jak to dowodzą następujące dane:

Esperackich towarzystw w oficjalnej statystyka podaje: w r. 1905 — 108, 1905 — 523, 1908 — 1575, 1910 — 1719.)

Esperackie czasopiśm wydawano w r. 1905 — 22, 1906 — 56, 1909 — 89, 1911 — z górą 100

Esperacka literatura w r. 1910 liczyła około 2000 tomów dzieł tłumaczonych i oryginalnych.

1) Z nich „Francuska liga” liczyła w 1909 r. 8766 członków, a „Esperacki Wszechświatowy Związek” („U. E. A.”) z Zarządem w Genewie w tymże roku liczył 7500 członków i posiadał w 478 miastach 44 krajów 618 swych konsulów, 705 delegatów i 206 subdelegatów.

Uczmy się Esperanta!

Znakomity podręcznik Pawła Bert'a Kurs Elementarny Nauk Przyrodniczych

W tłumaczeniu ANNY KRATZER, z 48 wyd. fran.

- TOM I. Rok pierwszy — dla dzieci od 7 do 10 lat. Treść: Człowiek, — Zwierzęta, — Rośliny, — Minerale, — Zjawiska codzienne, — 172 rycin. Cena w broszurze rb. 0,50, w oprawie 0,65.
- TOM II. Rok drugi, — dla dzieci od 10 do 12 lat. Treść: Człowiek, — Zwierzęta, — Rośliny, — Kamienie, — Fizyka, — Chemja, — 300 rycin. Cena w broszurze rb. 0,65, w oprawie 0,80.
- TOM III. Rok trzeci, — dla dzieci od 12 do 15 lat. Treść: Zwierzęta, — Rośliny, — Kamienie, — Ziemia, — Fizyka, — Chemja, — Fizjologia zwierząt i roślin, — Wiedza stosowana, — 550 rycin. Cena w broszurze rb. 1,15, w oprawie 1,35.

ŻĄDAĆ WE WSZYSTKICH KSIĘGARNIACH.

SKŁAD GŁÓWNY W KSIĘGARNI GEBETHNERA I WOLFFA W WARSZAWIE.

LIBREJO de M. ARCT

en VARSOVIO

Str. Nowy-Świat 53.

ventas ĉiujn librojn pri kaj en
ESERANTO:

Libroj, tekstoj en Esperanto
Lernolibroj

Vortaroj

Broŝuroj propagandaj
Literaturo

Scienco

Muziko

Poŝtkartoj

Jurnaloj

Oni mendu la katalogojn,
kiuj estas sendataj senpage.